Tiu programo sankcias la ŝtatan oficialecon kiel solan kriterion por difini kulturan kaj lingvan identecon, kreante per tio precedenton tre danĝeran jure, politike kaj etike: la ceteraj lingvoj estus definitive konsiderataj duarangaj spite al la efektiva disvolviteco kaj valora kontribuo al la mozaiko de la eŭropa civilizo; krome, programo "Lingua" neglektas la dimension de la novaj realaĵoj formiĝintaj kaj firmiĝantaj pro la migro-fluoj, en la sferoj gastlaborista kaj turisma; fine, la nuna lingvo-politiko de la Eŭropa Komunumo ne donas adekvatan konsideron al la atingoj de la Esperantlingva komunumo, kiu estas unika ekzemplo de praktika realigo de la Eŭropa civitismo.

La Kongreso

A L V O K A S al la sentemo de kultur-agantoj, politikistoj, asocioj kaj ĉiuj engaĝitoj por labori kune kun la esperantistoj cele al la modifo de la lingvo-politiko de la Eŭropa Komunumo, ene de perspektivo pli demokrata kaj pli praktika.

Kataluna Kongreso

La unua ŝoko ricevita de la kongresanoj estis la ne facila eltrovo de la akceptejo, malgraŭ la pluraj indikiloj metitaj survoje. Aŭ ili montriĝis malabundaj aŭ ne sufiĉe videblaj. Ni pretigos taŭgan solvon por venontaj kongresoj.

La komforta restadejo tamen tuj kompensis la kongresanojn kiuj kontente ĉeestis la solenan malfermon.

Muzika duopo riĉigis la ceremonion per interpretado de kelkaj klasikaj komponaĵoj, sed anekdote enŝoviĝis neatendite, ja ne klasika komponaĵo kaj tro hispaneca kiu estis unuanime rifuzata de la ĉeestantaro. La naivaj muzikistoj ĝentile sin ekskuzis per interpretado de aliaj pure katalunaj komponaĵoj.

Tagmanĝinte tuj okazis la du sinsekvaj prelegoj pri la kongrestemo, la unua fare de profesoro Claude Piron pri "Esperanto el socihistoria vidpunkto" kaj post mallonga paŭzo, la dua fare de prof. Pierre Janton pri "Esperanto, lingvo-hegemonio kaj naciaj kulturoj en Eŭropo".

Se mi kiel simpla ĉeestanto, devus raporti pri nia 24a Kongreso tute certe kvalifikos ĝin kiel unu el la plej gravaj. Unue kaj ĉefe, ĉar unuafoje en la historio de niaj kongresoj, ni devis trapasi ŝtatajn landlimojn por iel retrovi nin tute hejme kun niaj gefratoj katalunaj el transpireaj montoj.

Due, pro la agrabla etoso ĉe la universitata kvartalo kun ĝiaj komfortaj kaj bone ekipitaj instalaĵoj: dormoĉambroj, akceptejo, manĝejo kaj kongresejo kun la koncernaj promonadoj inter ili, ĉiam kun sana kaj freŝa aero meze de naturaj pejzaĝoj kaj monaĥeja trankvileco (certe nur kelkmomente rompita pro la malfrue enlitiĝanta junularo).

Resume: mi trovis la restadon ĝuinda tuj kiam mi forĝesis la unuajn malfacilaĵojn por trovi la vojon al la akceptejo. Trie, ĉar preskaŭ ĉio iris agrable kaj glate. Interesaj kaj gravaj partoprenoj eĉ de la komenco per solena malfermo de nia kara s-ro Llech-Walter. Kaj ankaŭ ene de la kongrestemoj la prelegoj de Claude Piron, Pierre Janton kaj Giorgio Silfer. Ankaŭ pro la agrablaj frandaĵoj el niaj 29aj Floraj Ludoj. Komencante per la festparolado de Timothy Brian Carr kaj la dolĉa melodia voĉo de Krys Ungar deklamante siajn premiitajn poemojn kaj eĉ en la posta urbeŝtrara lunĉo ni povis aŭdi favorajn vortojn ankaŭ katalunlingve fare de la aŭtoritatuloj.

Kvare, pro la muzika vespero kun Claude Piron kaj niaj junuloj kaj ĉefe la Arta Vespero dum kiu ni estis regalitaj per nia propra folkloro kun dancoj, muziko kaj kantoj malofte ĝueblaj, per tiu familia grupo kiu antaŭenirigas la "esbart Sant Jordi" tre simpatie kaj afable kaj kun tiel bela interpretado, ke oni facile forĝesis la malkomforton pro manko da sufiĉaj seĝoj.

La Muzika vespero ege sukcesis laŭ la ĝenerala opinio. La recitalo de Claude Piron kiu mem sin akompanis per gitaro, estis tre entuziasmiga kaj la koncerto de la sudkataluna duopo tre surpriziga pro la havankantoj kiujn la kongresanoj kunkantis kaj la posta bruldrinkaĵo.

La dimanĉa mateno estis dediĉita al la okazigo de la 29aj Internaciaj Floraj Ludoj, kiuj disvolviĝis en la urba kongrespalaco pro ĝentileco de la loka magistrato.

Tuj post la Floraj Ludoj kaj en apuda salono la kongresanoj estis regalitaj per lunĉo de la loka magistrato, kiu rekte reprezentis tre ĝentila magistratanino kiu bonvenigis la kongresanojn.

Posttagmeze okazis la lasta kongrestema prelego fare de D-ro Giorgio Silfer kaj sekve la ĉeestantoj debatis la temon.

Lunde matene okazis debato, laŭ invito de la gastiganta organizaĵo, pri la sociaj rilatoj inter la kataluna identeco kaj la esperanta internacieco. Montriĝis kongruaj laŭ la sperto kaj opinio de la intervenantoj. La debato estis tre kontentiga kaj pozitiva laŭcele montri la direkton de nia strebado. Tiurilate estis tre signifa, la esprimita solidareco de la ĉeestantoj eksterlandanoj.

Sekvis la Fermo de la kongreso dum kiu oni legis la rezolucion pri la kongrestemo, prilaboritan de speciala komisiono. Ĝi estis unuanime aprobita.

Kaj fine, antaŭ la kongrestema konkludo, la debato, laŭ speciala peto de la gastiganta organizaĵo, kiu intencis scii aŭ koni la ĝeneralan opinionon rilate la eblan aŭ ne eblan kongruon de la du ismoj: katalunismo kaj esperantismo.

Generale, almenaŭ tiuj kiuj intervenis, konsentis ke ili estas tute neapartigeblaj.

Certe ni sentas nin esperantistoj-do universalaj-ekde nia sinteno kiel katalunoj. Kiel kutime, estis ankaŭ konstatebla la rapida komprenemo de la eksterlandanoj konante nian tiklan situacion ene de la hispana ŝtato, pli ol la hispanoj mem.


Verŝajne ankaŭ influis trovi la kongreson tiom ĝuindan, la fakto ke mi povis vojaĝi al kaj el la kongreso kun vera grupo da samideanoj-kio ŝajnis daŭrigi la etoson-dank'al la simpatia oferemo de nia prezidanto kaj afablaj familianoj.

Resume: Mia opinio tre grava kongreso pro la finfina renkonto kun la nordaj katalunoj, pro la interesejaj paroladoj, debatoj kaj distraj vesperoj kaj ĉefe pro la tre agrabla ĝenerala kunvivado, kiuj restos longtempe en mia memoro.

Lluís Armadans (Barcelona)

Akcepto en la Kongrespalaco.





inaŭgura parolado

(Kataluna Kongreso de Perpinyà en Septembro)

Sinjoraj Moŝtoj ! Eksterlandaj invititoj ! Gesamideanoj el ĉiuj partoj de la Katalunaj Landoj !

Unuafoje en la historio de la kataluna movado ni kongresas ekster la limoj de la kutima ŝtato. En 1989 ni ŝanĝas la tradicion, la ŝtaton de la Kongresurbo, sed ne la nacion. Pro tio nia ĉi-jara Kongresurbo fariĝos - por ni, katalunaj esperantistoj - epokfara.

Perpinyà akceptis nin tiom varme kaj simpatie, kiom ni esperis. Ni antaŭsentis ke Perpinyà reagos tiel, ĉar de longe ĝi respegulas vivon por sciencoj kaj artoj ligitaj al la kataluna kulturo. Ne vane Perpinyà estis dum multaj jaroj la dua urbo de Katalunio laŭ graveco kaj nombro da enloĝantoj. En la XIIIa jarcento-kaj tio estas sendube unu el la kialoj de ĝia tiama kaj posttama brilo - Perpinyà iĝis ĉefurbo de la IIIa Reĝlando de Mallorca. Ĝenĵaj civitanoj de tiu Regno, ambaŭ verkistoj en la kataluna lingvo, estis la filozofo Ramon Llull kaj la medicinisto Arnau de Vilanova, grandeguloj de la universala kulturo. Unu jaron post la malapero de tiu Regno de Mallorca, en 1350, nia reĝo Petro la IIIa alinomite "La Ceremonia" starigis en la katalunlingva Perpinyà la fakultatojn de Belartoj, Juro kaj Teologio (kaj post kelkaj jaroj tiun de Medicino). Kaj mi volas reliefigi, ke ti okazis preskaŭ ducent jaroj antaŭ la fondo de la Universitato de Barcelona.

Ĉi tiu 24a Kataluna Kongreso estas nia dua kongreso en la dua jarcento de Esperanto. En tiu dua jarcento evidentiĝas ke Esperanto sekvas, eĉ pli strikte, la vojon iniciatitan proksimume je la mezo de la unua jarcento, la vojon de la forigo de la troaj eksteraj signoj de identeco. Naivaj personoj opinias ke Esperanto ne antaŭeniris, ke la movado restas stagna. Kaj tute ne! La movado ŝanĝis felice kaj definitive sian vizaĝon antaŭ la mondo kaj ĝi kreskis kvante (oni rigardu la oficialajn statistikojn) kaj ĉefe kvalite. Ni ne subtakstu NIAJN atingojn! Kaj mi substrekas la adjektivon "niajn", ĉar Esperanta sukceso en Ĉinio estas nia sukceso, prospero en Pollando iĝas prospero nia, pozitiva evoluo ie estas nia gajno.

Ni, katalunaj esperantistoj, estas fratoj de la tuta monda landaro. Ni esprimas laŭte: "For landlimojn! Ĉiujn landlimojn! Sed precipe tiun, kiu rekte koncernas nin: la malbenita landlimo inter la ŝtatoj Francio kaj Hispanio, kiu oficiale disdividas la katalunojn kaj ilian lingvoteritorion. Tiu oficiala limo kaj la deziro de la katalunoj esti memstaraj, la deziro defendi nian rajton al ekzistado, kion la "Ĉarto de la Homaj Rajtoj" defendas senkondiĉe, estas la du premisoj kaŭzantaj la aperon de granda sed konstatebla skismo en nia tendaro.

Kiam la "Generalitat de Catalunya" oficialigis KEA-n kelkaj gravaj katalunaj esperantistoj ne aliĝis al ĝi, aliaj aliĝis sed poste, iom post iom, malproksimiĝis kaj fine ekŝiĝis. Nur pro politikaj aŭ pseudopolitikaj kialoj. Zamenhof en la Universala Kongreso en Genevo en 1906 jam diris: "Nia kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj". Mi koncedas: jes, ĉiu povas havi sian apartan opinion pri politiko, sed dum oni agas por Esperanto ĉiu gardu ĝin en sia menso kaj ĝin ne uzu. Tiu estas la tikla punkto: la skismo aperis ĉar kelkaj el ni sentas sin kore ligitaj al Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) aŭ al Hispana Esperanto-Federacio (HEF), pro tio ke tiuj estas la koncernaj ŝtataj asocioj. Sed la sudkatalunaj suferis kroman malhelpon, ĉar la sidejo kaj estraro de HEF troviĝis dum la lastaj jaroj en Barcelona. Antaŭ tiu absurda KEA oficiale deklaris sin kontraŭa al tiu decido kaj proponis al la tiama estraro de HEF, ke ili respektu nian agadteritorion kaj evitigu ĉe ni kaj disdividon de fortoj kaj kontraŭuracian konkurencon. Paradoxke la afero nestis en Katalunio mem, vole preparita de katalunoj, eĉ de komitatano de nia asocio.

Ni plene indulgu ilin, ni ne ŝparu komprenemon, kvankam la saĝa Danto en sia "Dia Komedio" jetas en Inferon (en la naŭan burson de la oka rondo) la estigantojn de kvereloj kaj skismoj. Kaj HEF agis kiel Pilato: ĝi lavis siajn manojn, ĉar la fluo de la rivero favoris ĝian politikon. Tio efikis ĝis antaŭ unu monato kaj duono, felice nun la sidejo de HEF estas denove ekster la limoj de nia lingva teritorio. KEA pretas al egalrajta kunlaboro kun ĉiuj asocioj kaj precipe kun la najbare frataj UFE kaj HEF. Komprenoble oni povas konsideri sin franco kaj aliĝi al UFE aŭ hispano kaj iĝi HEF-ano, kial ne? Sed tio ne malebligas al ĉiu honesta esperantisto loĝanta en la Katalunaj Landoj esti ankaŭ praktika homo - Madrido kaj Parizo estas tro malproksime - kaj por la vere efika laboro en nia lingva determinita

agadteritorio, li estu ano de KEA. Sekvenda estas la devizo: pensu univ ersale, agu loke. Zamenhof, en la Krakova Kongreso de 1912, menciis ke sur nia standardo estas skribitaj la vortoj "espero, obstino kaj pacieno" kaj ke oni devus aldoni la vorton KONKORDO. La sola efika solvo por Esperanto ĉi tie kaj nun estas la plena konkordo inter ni. Ni konigu nian forton kaj strebu al plejofta interrilato kaj kunlaboro grupa. Do, de tiu podio mi alvokas ĉiujn esperantistojn loĝantaj en la Katalunaj Landoj, por ke ili reagu akorde kaj konkorde.

En klubaj kunveno ĉi-jara aktive energia samideano esprimis dubon pri la deveno de KEA. Mi volas klarigi tiun originon por ĉiam. KEA estas la sola heredanto de la Kataluna Esperanto-Federacio (KEF, de 1910, kiun la faŝistoj malaperigis en 1939. La aktuala posteularo, ni, alĝustigis nur la nomon de la asocio, sed konservis ĝian idearon, esprimitan en nia statuto; daŭrigis la numeradon de la serio de revuoj "Kataluna Esperantisto", oficiala organo kaj de KEF kaj de KEA; organizas la Katalunajn Kongresojn kaj persiste aŭspicias la Internaciajn Florajn Ludojn, konatajn de la tutmonda esperantistaro kiel la plej universalan katalunan manifestiĝon. KEA agas laŭ sia povo kaj laŭ la hipoteza deziro de KEF. Kaj mi tre ĝojas pri la ĉeesto inter ni de fervore aktivaj KEA-anoj, kiuj estis siatempe diligentaj KEF-anoj: ili devas atesti mian eldiron.

En la du unuaj punktoj mi celis la amon al la vero. En la tria punkto mi deziras aludi al felice. (Ni ne timu la malnovajn vortojn!). Ni vivas en ĉiama mondo. Ĉu la homo okazigos ĝian iom-post-ioman ruinigon? Mi estas ĉiama optimisto kaj kredas ke ne: la historio montras ke malgraŭ samtempaj retropaŝoj la mondo ĉiam antaŭeniras. Malgraŭ la nuna ŝajne senfina freneza konsumismo, la kresko de la nombro de toksiko-maniuloj (kaj televido-maniuloj!), malgraŭ ĉia perforto laŭdata de la propagandaj rimedoj, spite al ĉio la homaro progresas kaj ne nur teknike, sed ankaŭ spirite.

Mi vidas la tipan esperantan homon avangardulo, simbolo de nova epoko malpli gluista al materialismo, heroldo de spirita vasteco, de alta etiko, de toleremo. La fenomeno Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ estas tio, kion oni difinis per la esprimo "interna ideo", kiu esence estas amo al homaro sen posuli reciprokecon. Laŭ la modernaj psikologoj la sola ĝisfunda feliĉigilo estas ĝuste la amo sen esperi rekompencojn; ŝajnas kontraŭdiro, sed nur la homo kiu amas tiel estas vere feliĉa.

Krome, komence de la okdekaj jaroj aperis "ovo de Kolumbo" en Esperantio: la Manifesto de Raŭmo. Ĝi montras al ni la vojon: ni tenu alte la torĉon, sed dume ni ĝuu nian esperantistecon kaj montru al la mondo, ke ni kapablas - laŭ la Raŭma difino - diri ion kulture originalan kaj internacie valoran.

Kiam ene de la homo venkos la racio kaj la logiko, tiam venkos Esperanto kaj sen ia dubo tiu venko tuje malaperigos nian movadon: tiu estas la granda diferenco inter Esperanto kaj aliaj movadoj. La tempo flugas favore al ni, ju pli da tempo pasas des pli bezonatas konvena komunikigo inter la homoj por intenci solvi la ĉiumentem kreskantan komplikitan interrilaton. Ĉar neniu nacia lingvo estas taŭga por tiu grava rolo-tion jam asertis elstaraj lingvistoj antaŭ Zamenhof - kaj dum la lastaj 102 jaroj Esperanto montris sian taŭgecon, oni ne antaŭvidas en la nuna momento, en la kosma erao, alian solvon krom Esperanto. Sed eble la estonta homo, ni diru la galaksia homo, malkovros ĝis nun ne antaŭviditajn metodojn de interkomunikigo ĉu sensajn, ĉu per aŭtomatoj, kio ŝanĝos la problemon kaj ankoraŭ pli facile ĝin solvos.

Intertempe ni streĉu niajn esperantajn muskolojn, ni agu laŭ nia eblo kaj plaĉo por Esperanto. Ni ne tro parolu pri sinofero. Estu ankaŭ bonvenaj al niaj vicoj la homoj por kiuj Esperanto estas nur ilia plej amata ĉevaleto. Ni plenumu nian taskon en la loko pli taŭga por ni, por niaj kapabloj (ĉiu homo estas pli kapabla ol li/ŝi opinias), sed laboru ĝue, lasu flanken ĉiujn efemerajn ĉagrenojn, estu profunde feliĉaj esperantistoj.

JORDI CARBONELL I PINYOL
Prezidanto de KEA

Por Komencantoj

Comme demandé lors de notre dernière réunion, voici un texte pour débutants en F et E°. Il est tiré du nouvel ouvrage de l'infatigable L. Lentaigne (voir rubrique Montpellier). Le texte français est seulement pour le contrôle d'un mot inconnu ou oublié, il suffit de le coller au dos du texte en E°.

Nous publierons volontiers d'autres textes du même genre, c'est à dire avec un vocabulaire courant et pratique ou une construction spéciale à l'E°, si possible actuels.

Un débutant peut s'entraîner seul avec ce système de fiches en lisant un texte plusieurs fois dans la journée. Avec un groupe, on peut poser des questions pour raconter l'histoire puis les "élèves" racontent de nouveau l'histoire sans questions, l'enseignant se contentant d'aider par gestes ou par les premiers mots de la phrase. C'est en forgeant...

LA PRINCINO KAJ LA PIZO 19
(Estis iam princo, kiu deziris edziĝi kun "vera" princino.)

... Iun vesperon, la vetero fariĝis tre ege malbela kaj senĉese pluvegis. Iu frapis la pordegon de la kastelo. Ekster la pordo staris princino. Sed, ho ĉielo, kian aspekton ŝi havis! De ŝiaj haroj gutetis la akvo. Kaj dum ŝi staris, ŝi diris, ke ŝi estas vera princino.

"Nu, ĉi tion ni facile ekscios", pensis la maljuna reĝino. Ŝi iris en la dormoĉambron kaj, forpreninte la tutan litajn, metis pizon. Ŝi prenis dudek matracojn, metis ilin sur la pizon, kaj plie dudek kusenegojn faritajn el la plej mola lanugo.

Je la mateno oni demandis la princinon, kiel ŝi dormis. "Ho! malbonege! Mi preskaŭ ne ripozis. Mia korpo fariĝis blua kaj bruna."

Nun oni povis kun certeco scii, ke ŝi estas vera princino. Neniu alia, ol vera princino povus posedi tian mirigan sentemon.

(Laŭ ANDERSEN)

PENSU REKTE EN ESPERANTO.

19. (Il était une fois un prince qui désirait épouser une vraie princesse.)

... Un soir, le temps devint très mauvais et il pleuvait sans cesse à flots. Quelqu'un frappa à la porte du château. C'était une princesse.

Mais ciel! Quel aspect! L'eau dégoulinait de ses cheveux... C'est alors qu'elle dit qu'elle était une vraie princesse./ "Nous le saurons facilement", pensa la vieille reine. Elle alla dans la chambre et ayant enlevé la literie, elle mit un petit pois au fond du lit. Elle prit vingt matelas, les mit sur le pois, et en plus vingt gros coussins faits du duvet le plus doux qui puisse exister.

Le matin, on demanda à la princesse comment elle avait dormi. - Oh! très mal. Je ne me suis presque pas reposée et je ne comprends pas ce qu'il y avait dans le lit. Mon corps est devenu tout bleu et brun./ On pouvait maintenant être sûr qu'il s'agissait d'une vraie princesse. Personne d'autre ne pourrait posséder une telle sensibilité.

Se vi ŝatas Rok-muzikon

EUROKKA

Vi certe jam aŭdis (en Lézignan) aŭ legis (en SFS) pri Floreal Martorell (Tuluzo). Preciza adreso: 31450 Donneville.

Eurokka produktis disketon kun du E°-rokbandoj, Amplifiki (internacia kaj jam fama bando) kaj "La Rozmariaj beboj", nova E°-rokbando el Tuluzo. Aĉetu ĝin por via plezuro aŭ por junul(in)o, kiu ŝatas rok-muzikon, eĉ se li/ŝi ne konas esperanton (la tekstoj estas kun la disketo).

Mendu rekte al Eurokka ; disketo kostas 20F (nur!), aldoniĝas la sendkostoj : 8, 10 ĝis 5 disketoj (tarifo de 89), 12F ĝis 9, 17F ĝis 19 kaj 24F ĝis 39. Por pli grandaj kvantoj, se vi deziras, ke via tuta familio konatiĝu kun E°-rokmuziko, estas pakoj da 30 disketoj. La federacia libro-servo ankaŭ disponas pri stoketo. Helpu Eurokka vendi tiun disketon kaj produkti alian!

Korespondi. Regule ni ricevas ĉe SFS korespondpetojn kaj estas antaŭvideble, ke alvenos pliaj el la landoj de Orienta Eŭropo, kiuj deziras kontaktojn kun Francoj. Jen du el la ricevitaj petoj:

-Nikolao Larin, Pk 199 Soĉi 354068 Sovet-Unio (apud Kaŭkazo!) estas 35 jaraĝa fraŭlo, kiu ŝatas muzikon, legi librojn, vojaĝi, naturon, sporton kaj iomete parolas la francan.

-Krzysztof W. Bednarek 90-34 Łódź, ul. Gołębia 8.m.9 estas 29jara Polo, ankaŭ fraŭlo kaj laboras en turismo, interesiĝas pri Francujo kaj lernas la francan./Ni ankaŭ disponas pri adreso de 13/15j. geknaboj, speciale en Rio de Janeiro.

Alvoko de la HISPANA ESPERANTO-MUZEO

Al Sro Ludoviko Hernandez Izal, respondeculo de la muzeo, Strato Dro Zamenhof 12/E 08739 Sant Pau d'Ordal mankas la jenaj numeroj de SFS:

1 ĝis 11, 13, 15, 21, 22, 23, 25 ĝis 43, 66 ĝis nun.

Kiu bonvolus helpi lin kompletigi la kolekton? Ne forĵetu viajn malnovajn ekzemplerojn! Antaŭdankon! Jean Amouroux transsendos kun plezuro.

Ekologio kaj Esperanto

Pri la ĝenerala kunveno de la Franca verda partio informis nin Gérard Paing, Les Sagnes, 34390 Olargues, kiu partoprenis ĝin:

La 19an de Decembro en Marsejlo estis adoptita la jena propono:

"Fronte al la lingvo-problemoj renkontitaj de la Verduloj en la Eŭropa parlamento unuflanke kaj al la pligrandiĝo de la nombro da Verduloj en la tuta mondo aliflanke, fariĝas urĝe ke oni trovu rimedon por komuniki, kiu povas esti uzata de ĉiuj...//

//Por regi tiun lingvon je 80% sufiĉas 500 vortoj kaj 50 gramatikaj elementoj aŭ 150 labor-horoj. Estas do proponata al la ĝenerala kunveno de Marsejlo oficiale adopti la uzadon de E° kiel internacia lingvo kaj sisteme uzi ĝin dum niaj interŝanĝoj kun aliaj Verduloj, kies nacian lingvon ni ne komprenas.

Nur la universala lingvo Esperanto, kiu apartenas al neniu popolo aparte, garantias absolutan neŭtralecon en ĉiuj kampoj".

Voĉdonis por: 133 kontraŭ: 109 Sin detenis: 76.

Ni, verdulaj esperantistoj, feliĉiĝis pro tiu rezulto kaj daŭrigos nian agadon por la uzado de Esperanto kun, ni esperas, la helpo de multaj esperantistoj. Ne forgesu, esperantistoj, ke vi povas subteni (eĉ aliĝi) la Verdulojn, kies celoj estas la samaj: por pli bona mondo, por mondo, kie oni bone vivus.

Adreso de la regiona delegito: Mas Madagascar 30640 Beauvoisin

Ni aldonu la adreson de AVUE (Asocio de Verduloj por la uzado de E°) ĉe Emile Mas, Ekologio kaj Esperanto, 38 Rue Jean Moulin, 33220 Ste Foy la Grande.

E. Mas informas nin pri la salono "Vivi alimaniere", kiu okazos en Parizo, spaco Austerlitz de la 14a ĝis la 19a de Marto (kun E°-budo kompreneble).

La Eŭropa Kongreso de Verduloj okazos aŭtune en Hungario. Ĉar oni elspezis 50000F por tradukoj en 4 lingvojn dum la lasta kongreso en Parizo, espereble oni provos Esperanton venontfoje en Hungario. Oni serĉas homojn por samtempa tradukado al/el E°.

Sekvindaj kaj esperigaj aferoj, ĉu ne?

Pri la sama temo, ni ne forgesu, ke ek-ekzistas en nia regiono internacia ekologia centro.

Temas kompreneble pri "Mondhejmo". En St Chinian Sro Sanz, la kasisto, parolis pri la celoj.

La Prezidanto de Mondhejmo (J.-F. Passarella 6, Rue du Porche 34290 Servian/Tel. 67391630)

informis SFS, ke la unua ĉambro estas preta kaj loĝata. Oni konstruis kuirejton, duŝon kaj

neceŝojn, kun akvo kaj elektro. Sur la granda kampadejo estas aera duŝo varmigita per la

suno. Nun oni laboras por la dua ĉambro kaj preparas legomejon. Dum la jaro 90 estas

planataj ekologiaj kaj esperantaj staĝoj.

Se vi deziras pliajn informojn aŭ viziti Mondhejmon, kontaktu J.-F. Passarella.

La rapideco de la progresoj de Mondhejmo dependas precipe de financa subteno, do de vi.

Kaj, se vi ne bone komprenas Esperanton, jen resumo en la franca:

Le but de Mondhejmo est de construire un centre de rencontres internationales pour espérantistes et écologistes (stages d'écologie pour espérantistes, stages d'espéranto pour les écologistes, le tout pour une meilleure compréhension internationale).

L'association, fondée il y a 2 ans et qui a des membres dans de nombreux pays, a acheté trois maisons en ruines et 3000m² de terrain à Caùduro, à 40km de Béziers.

Il est prévu de construire une maison de 170 m² et de préparer un terrain de camping.

La construction déjà commencée a surtout besoin d'un soutien financier. On peut

-devenir membre : 50F/an après une adhésion de 300 F.

-prêter sans intérêts (en compensation, séjour possible sans payer la taxe journalière, jusqu'à hauteur des intérêts que verserait une banque)

-travailler bénévolement sur le chantier

-offrir du matériel (tente, matelas, sièges, caravane, couverts, matériel de cuisine, appareils de chauffage, chauffe-eau, matériel de construction...)

(Mondhejmo: CCP Montpellier 541-18V)

MONDHEJMO

dum Pentekosto (de la 1-a ĝis la 5a de junio 1990)

82a Franca Kongreso de Esperanto

en la KASTELO de BLOIS

Jes, ja! La kongreso ne nur okazos en la fama urbo sed EN la historia kastelo mem. Kia okazontaĵo !



La fama ŝtuparo de la kastelo de Blois

SENDETALA PROVIZORA PROGRAMO

Vendrede, 1-a de junio

Posttagmeze: akcepto de la kongresantoj en la stacidomo

18.00 ĝis 22.00 h. Akcepto en Kongresejo aŭ alia loko kaj Interkona Vespero kun Hispana Bufedo (ne tute Hispana).

Sabate, 2a de junio

09.00 h. Estrarkunsido

10.00 h. Oficiala Malfermo

11.00 h. Festa Prelego

12.00 h. Honorvino en la Urbodomo

15.00 h. Generala membrokunveno

17.00 h. Prelego

18.00 h. Fakaj kurvenoj

20.30 h. Kultura Vespero

Dimanĉe, 3a de junio

08.30 h. Komitatkunsido

09.30 h. Generala membrokunveno

12.00 h. Fino de la G.M.

14.00 h. Komitatkunsido

15.00 h. Gvidata vizito de la kastelo aŭ de la Urbo de Blois

18.00 h. Libertempo - (Diservo)

20.30 h. Bankedo kaj poste Ballo

Lunde, 4a de junio

09.00 h. Komitatkunsido

10.30 h. Prelegoj

12.00 h. Fermo de la Kongreso

14.30 h. Duontaga Ekskurso (ĝis 19/00)

„Kelkaj paŝoj en la Valo de Loire”

20.30 h. Distra Vespero

Marde, 5a de junio

09.00 h. Ĝis 18.00: Turisma rondiro en Sologne

„Spurante Raboliot”

Kotizoj: (eksterlandanoj : senpage)

ĝis la 28/2 : membroj 200F nemembroj:220F poste215/235F

geedzoj 330F " 340F 345/355

junuloj 130F " 150F 140/160

Taga aliĝo surloke : 100F

Sendi kotizon kun aliĝilo kaj ĉeko al Roger Pons 24 Mail Pierre Charlot 41000 Blois
Atentu! Pro la granda nombro da turistoj dum Pentekosto en Blois, la hotelĉambroj devos esti rezervitaj almenaŭ du monatojn antaŭe.

La 45a Sat-Amikara kongreso (Laborista Esperanto-Asocio por Franclingvio) okazos de la 14a ĝis la 17a de Aprilo (Paska semajnfino) en Bondy apud Parizo.

Tuttaga ekskurso kaj duontagaj ekskursoj al La Villette kaj La Geode.

Sabaton vespere kantos Nikolin kaj Max Roy Carrouges

Por ricevi aliĝilon skribu al Sat-Amikaro aŭ al A.Legros, 22 Avenue Dumesnil 93140 Bondy

La venonta Sat-Kongreso okazos en Linz (Aŭstrio). Oni ankaŭ organizos antaŭkongresan feriosemajnon de la 28a de Julio ĝis la 4a de Aŭgusto en la montara ferioloko Maria Alm kaj postkongresan feriosemajnon de la 11a ĝis la 18a de Aŭgusto en la aŭstria ĉefurbo Vieno. Jen do la ebleco pasigi tri sinsekvajn semajnojn en Aŭstrio, en tri diversaj lokoj kaj en Esperantio.



Federacia Kongreso en Alès la 5an kaj 6an de Majo. Notu la daton!


Finiĝas via legado de la n° 111 de SFS.
Malgraŭ la aldono de 2 paĝoj mankis kelkaj paĝoj por rakonti vojaĝon al Islando, informi vin detale pri la staĝoj de Greziljono, La Chaux de Fonds, Bouresse, por ĝui la filatelian kronikon de J. Amouroux, por rakonti al vi kiel evoluas niaj Ministroj koncerne lingvojn kaj esperanton, ktp.
Tiu teksto aperos en la venonta numero (espereble). Ni pardonpetas la senditoj pro la prokrasto. Aliajn kontribuojn SFS ankaŭ bezonas. Kiel jam ofte dirite, de vi la legantoj... dependas la enhavo. Sugestojn, rimarkojn vi rajtas fari. Plian fojon ne forgesu la limdaton. Pro la ioma malluigi de tiu-ĉi numero grandparte kulpas tiuj, kiuj promesis informi sed ne (re)agas sen admono. Ni rendezuu je la Paska periodo por la legado de la n° 112!

Ludoj

de René Raynaud

KRUCVORTOJ (R=Radiko)

Horizontale: I. Birdreĝo. II. Aroma arbedo (R). III. En Italio. Fonetike: Ano de Germana tribo. Prepozicio. IV. Faru kiel la koko. V. Famaj estis tiuj de Eskulapo en Epidaŭro. VI. Mallongigoj de du kontraŭaj kardinalaj punktoj. Inverse: greka monero. VII. Okupo, profesio. Inverse: fiŝo (R). VIII. Hilo se ĝi estas verda. Pronomo. IX. Spirita atmosfero de...iu pejzaĝo. Sur la lavŝtono (R) X. Nomo de litero. Placo en Parizo/



Vertikale: 1. Speco de violo (R). 2. Granda helico kun vertikala akso (R). Fatalo. 3. Japanino. 4. En enigmo. Troo. 5. Ĝi portas la akson de rado. Inverse: piedvesto. 6. Ilo por desegnisto. 7. Prepozicio. Korpoparto. La sama sed fonetike. 8. Vazetoj mortigitaj de la globkrajonoj. Inverse: moviĝi (R). 9. Restigadas en akvo. 10. Aŭstralia mamulo (R).

SENVOKALAJ PROVERBOJ (kompletigu)

- S- n-ĝ-s s-r l- m-nt-, -st-s m-lv-rm- -n l- v-l-.
- S- ĉ- b-l--s -nt-- s-- p-rd-/t--m -n l- t-t- -rb- -st-s -rd-.
- S- m-s- n-r -n- tr--n d-sp-n-s/ĝ- b-ld-- l- v-v-n f-rd-n-s.

VERTIKALA KLASIFIKO : Ordigu vertikale la literojn de ĉiu kolumno.
***** Vi tiam povas legi proverbon.

A	L	J	E	A	F	C	D	U	I	P	O	I	T	T	O	M	N	O	V
A	A	J	G	L	L	I	I	M		K	R		N	I	E		P	A	
K					A	A	O												
.	.	-	-	-
.	.	.	-	.	.	-	-	.	.	.	-	.	.	.
.	-	.	.	-											

SOLVOJ DE LA NUMERO 110

Krucvortoj: Horizontale.
I. Harsplitanto. II. Universa -la. III. Ft. Alk. Rezon. IV. Fa -tras. Agata. V. Eg. Mr. Eno. It VI. Rok. Gastrito. VII. Ink. Osteino. VIII. Sireno. Lot IX. Ts. Liceo. Eki. X. Otozo. Trap. XI. Jora. Neniu XII. Nj. Skadr
Vertikale: 1. Hufferistojn 2. Antagonistoj. 3. Ri. Kkr or. 4. Svarm. Elzac. 5. Pelagornio. 6. Lrks. Aso -cioj. 7. Is. Est. Em 8. Tarantelo. Ns. 10. Naza. Interna. 9. Alegorio. Tek. 11. Otito. Kaid. 12. Ornato Vipur.

La ĉi-apuda bildo estas fakte plurkolora kaj pli-grandformata. Gi estas eldonita de CERL 7, Rue Major-Martin 69001 LYON, kie vi povas mendi ĝin...por I991.



Anagramoj (n°110)

Arbo, lupo, inko, armo, jako, tero, esti, mono, pizo, okro, jaro, alko, loko, ikso, akto, joro, milo, ovoj, rato, oleo, vero, koloro, ursino, triono, italoj, madono, oblato, eklogo, strabi, trotus, aktoro, struto, dinaro, unesko, arniko, nivozo, aborti, teatro, unesko, ratino, oblato

Aliaj tempoj, aliaj moroj. Kutimo estas 2a naturo

La numero 112 aperos mez-aprile. Sendu kontribuojn NEPRE antaŭ la 31a de Marto al: Jean Hénin Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue